

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine.

Tel. 02 35 34 28 78.

LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo

Dum la Paskosemajnfino de vendredo la 22-a ĝis mardo la 26-a de Aprilo 2011, riĉa kultura kleriga kaj turista programo atendas vin en la ĉarma suna ĉemediterranea havenurbo Seto: temas pri la Inter-asocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo, kunorganizita de pluraj Esperanto-asocioj agantaj en francalingvio : Esperanto-France, SAT-Amikaro, esperantistaj Fervojistoj, Geinstruistoj, Katolikoj, FET ...



Al la aranĝo invitas Langvedoka-Rusiljona Federacio aganta per LOKO : tio estas Loka Organiza KOMitato.

La renkontiĝo okazos en Le Lazaret, komforta feriejo en la urbo Seto ĉe Mediteraneo, kiu provizas multajn dormlokojn, surlokan manĝon salonegon kaj kunvenejojn. De la jaro 1978 okazas finaŭguste en Le Lazaret la Internacia Semajno de Esperanto.

Ĉiutage per duhoraj vizitoj en la naskurbo de Georges Brassens kaj de Paul Valéry konatiĝu kun Seto kaj ties tuja ĉirkaŭaĵo. Ĝuu ankaŭ la mediterraneajn specialaĵojn kaj la buntan bazaron. Marde vi povos elekti inter tri tuttagaj ekskursoj por malkovri iom el multaj kuriozaĵoj de la regiono kun siaj memoraĵoj el Antikveco, kaj tradicioj ligitaj al la riĉaĵoj eltiritaj el la maro.

Por vesperoj dancigaj aŭ etosigaj prezentiĝos Jacques Yvart, JoMo kaj Solniŝka, Teatro-Trupo de Tuluzo, FaMo, Kapriol', Kaj Tiel Plu.

Dominique Gautier prezentos sian filmon pri la Esperanto-movado premiere.

IREM 2011

Loka Organiza KOMitato

13bis rue Haute

FR 30310 Vergèze


Poŝtkonto : 956-28P Montpellier

Telefono : 04 67 39 16 30

Piaj informoj kaj aliĝado je

<http://esperantosete2011.fr>

En tiu numero :



Japanino en Centra Afriko.	2
« Esperanto.com » lanĉita.	4
Nova « edukado.net ».	4
Nia bulteno tra jaroj. (7).	5
Grésillon - Kvinpetalo.	6
Kotizintoj 2010 - 2011 Financa raporto 2010.	6

Rememoraĵo pri travivaĵo de japana esperantistino en Centra Afriko.

Estis en 1973; tiam, 45 jaraĝa teknikisto, mi vivis kun mia familio en Bangui, ĉefurbo de Centrafrika Respubliko, kie mi laboris pri la aerodromoj. En tiu lando, pro politikaj kialoj, la interurbaj vojaĝoj ne estis tute liberaj, kaj policopostenoj kontrolis ĉe ĉiuj ekstremaĵoj de la ĉefurbo la en- kaj el-irojn de veturiloj. Krome, la vojoj estis maloftaj, netegitaj, mallarĝaj kaj malbonegaj.

La 21an de aŭgusto frumatene, mi hejme ricevis telefonavokon de la polico kiu kontrolis la movojn ĉe la orienta ekstremaĵo de Bangui; jen la resumo de la interŝanĝo :

- **Policisto** : « Ĉu vi konas iun fraŭlinon Jamiko K. ? (mi forgesis la justan nomon), ŝi estas japana.

- **Mi** : « ne ! »

- **P.** : « Ŝi ne parolas la francan kaj ni ne komprenas la anglan. Ŝi petveture alvenis de Bangassou per kamiono. Ni sukcesis kompreni ke ŝi venas de Kenio. Ŝia pasporto ne posedas la centrafrikan vizon. Ŝi tranoktis en nia posteno kaj ni ne scias kion fari el ŝi; ŝi diras ke ŝi konas vin, kaj nin montris fremdlingvan libreton kie troviĝas via nomo kaj adreso. Ah ! Ŝi signas ke ŝi volas paroli kun vi, ĉu vi konsentas ? »

- **Mi** : « Jes, ŝin transdonu. »

- **Ŝi** : « Bonan tagon sinjoro Rousseau ; mi estas japana esperantistino kiu petveture trairas Afrikon por propagandi por Esperanto. Mi trovis vian adreson en la jarlibro de UEA. Tie, mi speras kelkajn malfacilaĵojn, ĉu vi povus min helpi por reguligi mian situacion, kaj por havi kontaktojn kun la lokaj radio kaj gazetaro ? Mi ŝatus esti intervjuita pri la Internacia Lingvo. »

- **Mi** : « Nun mi komprenas ! Jes, mi kun plezuro vin helpos. Min redonu la policiston. »

Kaj mi klarigis al li pri kio temis, kaj li kun kvietigo konsentis por ke mi venu ekzorgi pri la

Japanino. Mi do veturis kvin kilometrojn al la policejo, kaj tie konatiĝis, kun eble 25-jaraĝa bela samideanino, antaŭ la admirantaj policistoj, kiuj kredis ke mi parolis la japanan. Unue mi veturigis ŝin miamen, kie stariĝis tikla problemo.

Mia edzino estis pretiganta la bagaĝojn, ĉar morgaŭ -on matene ŝi estos aviadile definitive forironta al Francio kun niaj kvar tiamaj infanoj. Mi mem estos rekuniĝonta kun mia familio en Francio tri semajnon poste. Tiu neanoncita elĉiela falo de junulino, traftrafe kelkajn horojn antaŭ ol la foriro de mia familio povis esti altagrade suspekta. Ĉu tio ne estis de longe programita aranĝo, kaj ĉu ni ne estis erarintaj je unu tago pri la dato ? Mi tre facile sukcesis konvinki mian edzinon pri mia senkulpeco, ke temis nur pri koincido ; tamen, mi ne povis ricevi la junulinon hejme dum foresto de la familio, dum male ni estus volonte ŝin gastigintaj en ordinaraĵoj cirkonstancoj; Tio maloportune okazis, ĉar la junulino estis ne havis monon elĵeteban; mi do kun bedaŭro devis ŝin konduki al malmultekosta hotelo.

Anstataŭ okupiĝi pri mia forironta familio, kun konsento de mia edzino mi dediĉis la pejparton de tiu tago al veturigado de nia vizitintino, por reguligi ĉe la taŭgaj Administracioj ŝian restadon enlande. Mi ankaŭ direktis ŝin al respondeculoj de la lokaj radio kaj gazetaro. Ili tre volonte akceptis intervui ŝin, ĉar la persono kaj la traktota temo eliris el la kutimaĵoj ; posttagmezon mem, oni registris duonhoran intervjuon de ŝi. Mi tradukis alesperanto la demandojn al ŝi faritaj en la franca, kaj francen ŝiajn esperantlingvajn respondojn. Ĵurnalisto ankaŭ nin pri-demandis.

Sed mi poste devis rekonduki nian amikino al ŝia hotelo, ĉar vespere de tiu sama eventoriĉa 21a de aŭgusto 1973a, laŭ la kolonia kutimo inter blankuloj, ni estis invitataj de niaj kolegoj-najbaroj pro la foriro de mia familio. Ili jam ĉiuj estis informitaj pri la alveno de la Japanino, kaj la ŝercaj aludoj pri la « dateraro » estis nombraj ...

Vespere mem, nia intervjuo estis dissendita de Radio Centrafrique.

22a de aŭgusto 1973 : Je la deka kaj duono la aviadilo ekflugis, kun ene, mia familio. Iom neglekta mian laboron, mi povis dediĉi pli da tempo al nia samideanino, kiun mi kunprenis el sia hotelo.

Ni aĉetis la lokan ĵurnalon : longa kaj tre favora

Artikolo estis publikigita pri esperanto, kun fotoj de Jamiko.

Ŝi kiel eble plej rapide volis pretigi la daŭrigon de sia vojaĝo. Ŝi deziris iris petveture al Brazzaville, en Kongio. Sed tute maleblis: eĉ ne estis eta pado tra la densa arbaro. Aviadile estis tute ekster konsidere, ŝi ne povis (aŭ ne volis?) pagi la bileton. Restis nur la rivera rimedo sur Ubangio kaj Kongo. Ekzistis inter ambaŭ urboj, distancaj je proksimume 800 kmj, monata interligo, kiu daŭris ĉirkaŭ du semajnojn. Loka transporta kompanieto ekspluatigis unu malnovan vaporŝipeton, kiu per kabloj remorkis du sinksekvajn barĝojn. Estis tri klasoj:

- En la unua klaso, oni vojaĝis sur la motorŝipo, sur la ne tro okupita ferdeko, sen kajuto.
- En la dua klaso, oni vojaĝis sur la unua barĝo, super kiu estis aranĝita foliaĵa tegmento.
- En la tria klaso, oni vojaĝis en la dua barĝo, sen-tegmenta.

En nenia klaso la pasaĝeroj estis nutritaj: ili devis, ĉu kunporti sian manĝaĵon por du semajnoj, ĉu esperi aĉeti ion en la hazarde renkontitaj vilaĝoj de la okcidenta bordo, ĉar la orienta estis Zairo, la eks-Belga Kongio; ĝi ne havis la saman monon kaj la lando ne estis tute sekura! Kompreneble, neniam frekventebla blankulo tiel vojaĝis.

Nia Japanino tamen senhezite elektis la tre malkaran trian klason. Mi estis hororigita je la ideo forlasi tiun delikatan kaj kulturitan junulinon en tiaj kondiĉoj, sub la suno, la oftaj ekvatoraj pluvegoj, kuloj, premita inter ĉiuspecaj bagaĝoj, ŝvitantaj kaj kriantaj homoj. Pri tiu priskribo mi ne enmetas la plej etan malestimon, mi nur juĝas la konkretajn cirkonstancojn de la farota vojaĝo.

Tre feliĉe, favora hazardo faris ke la proksima ŝipo foriros morgaŭon matene.

La mono kiun ŝi posedis jam ne sufiĉis por pagi la du tranoktadojn en la hotelo, kaj la ŝipbileton; mi devis elekti kion mi persone pagus. Mi elektis la dormĉambron, kies fakturo pligrandigis ĉiutage se ŝi restus; mi krome min sentis iom respondeca, pri ŝi kaj pri la hotelo, ĉar mi estis ŝin kondukinta tien. Kaj pro klaĉadoj, estis tute ekster konsidere ke ŝi loĝu en mia domo, kiun krome, ankaŭ mi estis forlasonta je la venonta 12-an de septembro, t.e. antaŭ

la sekvanta foriro al Brazzaville de la reveninta ŝipo.

23-a de aŭgusto 1973: Matene mi do kunprenis nian japanan amikinson el sia hotelo, kaj kondukis ŝin al Ubangio la kajo kie ŝi enbarĝiĝis. Mi estis kunportinta dekon da sardinskatoj, kelkajn konservoskatolojn, panojn, bananojn kaj kovrilon. Ŝi dankis, sed dirante ke ŝi estas vegetaranino: sardinoj kaj konservoj estos valora interŝanĝorimedo por fruktoj dum la vojaĝo. Je la naŭa kaj duono, la ŝipo eligis la ŝnurfiksilojn. Adiaŭ Japanino! Vivu Esperanto!


Koncerne la esperantista movado, la rezulto de nia unutaga reklamado estis nula. Diference de Madagaskaro kaj Senegalio, la tiea indiĝena loĝantaro estis tro malklera kaj malriĉa por interesiĝi pri tia temo; kaj pri la blankuloj, ili havis aliajn zorgojn.

Mi ne memoras kiel, longe poste, mi havis novaĵojn pri ŝi. Ŝi estis bone atinginta Brazzaville, kaj poste Eŭropon, kie laŭdire, ŝi edziniĝis kun norvega esperantisto.

Tiel, mi rakontis ŝian travivaĵon en Centrafriko, de la ekstera vidpunkto de serioza matura, eble pro afrika sperto, iom timema fremda ŝtatoficisto, teknika asistanto. Estus interese scii kiel ŝi mem spertis la aferon, kun detaloj pri ŝia surrivera vojaĝo, kaj pri aliaj antaŭaj kaj postaj epizodoj. Eble ŝi tion jam priskribis?

Henri ROUSSEAU

(Mathieu, la 7an de septembro 2008)



Paĝo 4a

Gama-versio de esperanto.com lanĉita !

La 10-an de decembro 2010 estis lanĉita la gama-versio de la virtuala komunumo de esperantistoj <http://esperanto.com>.

Tio estas la rezulto de multmonata laboro, dum kiu estis faritaj miloj da diversaj ŝanĝoj : estis solvitaj pluraj teknikaj kaj tradukaj problemoj, aldonitaj novaj funkcioj kaj plibonigitaj la malnovaj.

Esperanto.com, lanĉita en februaro 2010 kun la stato « beta », sukcesis akiri pli ol 1500 uzantojn, kiuj publikigis ĉirkaŭ 1000 blogaĵojn en Esperanto kaj milojn da komentoj.

Krome estis aldonitaj ĉirkaŭ 150 variaj grupoj kaj eventoj. Inter la grupoj vi povas trovi tiujn pri fabeloj, sportoj, movado...


Esperanto.com celas unuavice disponigi plurajn unikajn senpagajn interretajn servojn por esperantistoj kaj subteni la Esperanto-movadon.

Kadre de tio, ekzemple, en la gama-versio de la retejo estis antaŭvidita multspeca sistemo de Esperanto-eventoj, kiu permesas al la organizantoj de eventoj aldoni proprajn eventojn kaj informi pri ili la uzantojn.

Ĉiu uzanto nun povas havi propran kalendaron de E-eventoj, partopreni diskutojn de la eventoj, aldoni fotoalbumojn pri la pasintaj eventoj, publikigi impresojn k.a.

La gama-versio de Esperanto.com enhavas plurajn sociretajn eblojn, tamen ne celas anstataŭi grandajn internaciajn kaj naciajn sociajn retojn (ekz. facebook, ipernity, vkontakte k.a.) Ĝi estis kreita por komunikado inter la esperantistoj, por ke ili pli rapide kaj pli facile povu trovi unu la alian, kaj kunordigado de la E-movado ĝenerale.

Indas noti, ke Esperanto.com uzas liber kodan EMS (enhav-mastruman sistemon) Drupalo, kiu havas interalie Esperanto-komunumon kaj estas uzata por konstrui plurajn esperantistajn retejojn.



**Dima Ŝevĉenko
Anna Striganova**

Artikolo el « **Esperanto Revuo** » oficiala organo de :
Universala Esperanto Asocio - n°1243 januaro 2011

Esperanto.com
nia komunumo



Tute renovigita atendas vin : edukado.net

La 3-an de oktobro 2010 estis lanĉita kun virtuala festo la rekonstruita retejo www.edukado.net. post 14-monata konstrulaboro... Du ciferoj : la registritaj uzantoj estas pli ol 2200 kaj en la pasintaj 5 jaroj la ekzercoelŝutoj superis 120 milojn.

La paĝaro ne nur teknike renoviĝis, sed ekhavis ankaŭ tutnovajn sekciojn. Elstaras el ili la mondmapo de membroj kaj alia mapo de la Kursejo (kun movadaj kaj lerneaj kursoj kaj kursgvidantoj), t.e. guglo-mapo, sur kiu per diverskoloraj piktogramoj estas markitaj la koncernaj lokoj. Tiel la vizitantoj facile povas trovi kurs- informojn laŭ geografiaj lokoj.

Grandan sukceson havas, krom la kolekto de eldonitaj lerniloj, lernolibroj kaj uzpretaj ekzercomaterialoj, la **Panteono** de la meritplenaj instruistoj de Esperanto...

Sciencajn celojn servas alia nova parto, la sekcio **Diplomlaboraĵoj** : detalajn informojn pri la pli ol cento da universitataj kaj altlerneaj diplomlaboraĵoj, verkita en Esperanto aŭ en ajna lingvo pri esperantologio aŭ interlingvistika temo...

La paĝaro havas ankoraŭ dudekon da aliaj funkcioj, malfacile prezenteblaj en mallonga raporto. Pli valoras vizito kaj krosado da paĝoj (plurdekmiloj) de la jam 9-jara kolekto. Le retejo estis rekonstruita laŭ la planoj de la redaktoro kaj realigita de la kompetenta kaj subtenema programisto Jevgenij Gaus. La brila rezulto ne estus atingebla sen la subteno de ESF, (*Usona fondaĵo : Esperantic Studies Foundation*) plie sen malavara helpo de deko da grandaj sponsoroj kaj 220 individuaj donacintoj kiuj kunmetis la necesan sumon de 35 mil eŭroj...

Atendas vin www.edukado.net kaj ĝia redaktoro,

Katalin Kováts

Artikolo el « **Esperanto Revuo** » oficiala organo de :
Universala Esperanto Asocio - n°1241 novembro 2010.

ESPERANTO - NORMANDIE

Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures

Listo de kotizintoj por 2011

Bonvolu aldoni al la lasta listo Sinjorinon : DUBUC, kiu pagis por 2010.

Listo de kotizintoj por 2011 : je la 5a de januaro 2011


Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Jam pagis por 2011, ge-Sinjoroj :

CARON, CHALM, COLOMBEL, DUBUC, DUFEU, DUFRESNE, EVRARD, GASCOIN, GROULT, LANGEAIS, LEMARCHAND, LEPERD, LEPREVOST, LESVEQUE, MAGEREL, MAURAU, MICHAUD, MULOT, QUILLAUD, SERY, TAILPIED, ZILLIOX.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**

Abon-kotizo por 2011 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.




Anna Striganova el
« Esperanto.com » salutas vin !

Financa raporto je la 31a de decembro 2010

ENSPEZOJ (Eŭroj)		ELSPEZOJ (Eŭroj)	
Ce CCP, la 1a de januaro 2010 :	2 579,88 €		
Kotizoj : De la 01/01/2010 ĝis la 31/12/2010 :	605,00	Bulteno : Etikedoj por kovertoj : 58,22 Sendado : leterkovertoj + poŝtmarkoj : 276,20 Fakturo presisto : 215,00	549,42
		Poŝtbanka Administracio	11,50
Sumaj ENSPEZOJ :	3 184,88 €	Sumaj ELSPEZOJ :	560,92 €
		Ce CCP, la 31a de decembro 2010	2 623,96 €
Bilanco	3 184,88	Bilanco	3 184,88

Por viaj ferioj, staĝoj, kursoj... ne forgesu niajn du internaciajn kulturcentrojn :



GRESILLON

Organizas aŭ gastigas kursojn, prelegojn, distraĵojn kaj ekskursojn en belega regiono. Disponas, krom ĉambroj, bibliotekon, libroservon, butikon, migradpadon, flugpilkejon kaj tenistablojn, kun 18-hektara parko.

Kulturdomo de Esperanto

Château de Grésillon
49150 Baugé

Tel : 09 51 64 10 34

kastelo@gresillon.org

www.gresillon.org

KVINPETALO

Organizas staĝojn por instrui Esperanton kaj pri diversaj aspektoj de la Esperanta kulturo (historio de la movado literaturo ktp) kaj ankaŭ staĝojn pri diversaj fakoj (ornitologio, joko, trikado, muziko, astronomio, piedmigrado botaniko ktp) per Esperanto.

Kvinpetalo Esperanto Centro

15 rue du Lavoisier 86410 Bouresse

Tel : 05 49 03 43 14 - 06 07 31 67 81

informoj@kvinpetalo.org - www.kvinpetalo.org

